4-a Jaro. N-o 199 APERAS SEMAJNE 26. Julio 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

RÉDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner


INTERNACIA VIVO

Multege kaj ĉie oni parolas pri paco. La propono de Brian'[1]) deklaranta la militon eksterleĝa, estas studata en Vaŝingtono, Londono, Romo, Tokio kaj Berlino.

Kion ajn decidu pri ĉi tiu afero la grandaj naciaj ŝtatoj el Eŭropo kaj Ameriko, ni preterire certigas, ne timante erari, ke la paco estas absolute neebla, kaj ke nova milito eksplodos, fatale, kaj eble tre baldaŭ.

Ni nin ne kredas profetoj, nek ni vivas en la intimeco de la kancelarioj. Ni studas Eŭropon tia, kia ĝi eliris el la traktato de Versaj', kaj tio sufiĉas, por ke ni antaŭdiru, ke la funebraj tagoj de barbareco kaj mortiĝo reviviĝos en tiu ĉi malnova kontinento disigita, malriĉigita kaj malebligita je ĉia movo pro la ŝtala kolŝnuro, kiun reprezentas la plano de Dos[2]).

Ni rigardas la landkarton de l' politika Eŭropo, kiun oni faris en 1918. Ni scias pere de Miŝele'[3]), ke la tuta komerco kaj prospereco de la popoloj venas de la maroj, ke la insuloj kaj duoninsuloj kun ampleksaj brakoj intermitaj en la maro progresas komercante rapidege, dum la aliaj nacioj fermitaj en la kontinentoj estas devigataj suferi mizeran kaj pruntedonitan vivon. El tio ni devas konkludi, ke milito estas neevitebla kaj justa kiel ribelo de sklavoj submetitaj al potencaj sinjoroj.



Pro la mito, ke ĉiu popolo rajtas sin mem regi, en la centro de Eŭropo, post la milito, oni konsentis, ke la malgrandaj ŝtatoj estu "liberaj nacioj", partigante popolojn, kiuj estis unuiĝintaj por sin defendi.

La aŭstra-hungaria imperio kun ĉiuj siaj difektoj, kvankam ĝi estis konstanta minaco por la paco, havis rajton ekzisti: ĝi havis la taskon kunligi la mezan Eŭropon kun la Adriatika maro.

Hodiaŭ ni jam vidas, kiel la "libera" Hungario almozpetas pro haveno ĉe Italio tra Fiume. Italio konsentas, kondiĉe, ke ĝi aĉetu militilojn ne bezonatajn. Kiam estis eltrovata la kontrabando, ĝi ne sciis kion diri al la Ligo de Nacioj. La granda Polio, elŝirita el Rusio, vivas sufokite inter potencaj malamikoj kaj ploras en la brakoj de Francio, kiu ĝin helpas, kontrolas ĝian industrion kaj ĉe kiu ĝi devas aĉeti la import-produktojn. Aŭstrio, kies ĉefurbo havas pli ol 2 milionojn da loĝantoj kaj entute 6 milionojn, ne povas labori, ĉar ĝi ne povas vendi; ĝia savo estas, ke ĝi kuniĝu kun Germanio, kion malpermesas Anglio kaj Francio. 30 po cento de la urboj en Latvio kaj Litovio estas anglaj; la politiko de Jugoslavio estas farata en Parizo; tiu de Grekio en Londono; tiu de Ĉeĥoslovakio en Berlino; tiu de Eŭropo en Vaŝingtono . . .

La malfortulo, kiel ni vidas, vivas submetite al fortulo. Eŭropo ne estas ligo el popoloj, kiuj serĉas sian vivmanieron: ĝi estas aro el konkurantaj ŝtatoj antagonismaj, kun artefaritaj interesoj, kun altaj landlimoj kaj bajonetoj, kiuj malhelpas ĉian ekonomian disvolviĝon, kiuj karigas la vivon tiom, ke la proletoj ne povas vivi konvene.

Eŭropo modelita laŭ la Versaja traktato estas kolonio de Usono. Francio bezonas 60 jarojn, por pagi siajn militŝuldojn, 60 jaroj, dum kiuj devas laboregi ekspluatataj ĝiaj kolonioj kaj laboristoj, dum kiuj ĝi devigas la protektatajn naciojn, fari komercajn traktadojn, el kiuj ĝi mem profitu. Ĉiuj nacioj tial, la grandaj kaj la malgrandaj, pro sama kaŭzo donante sian tributon, servas al la granda sinjoro de la komercaj kontoroj kaj de la dolaro.

Tial la ĉefaj nacioj de Eŭropo deziras la pacon, kaj tial tamen tiu magia kaj aldeziregata stato ne regos. Ne estos paco, ĉar ĝi estas tute neebla. Iutage okazos, ke la malgrandaj nacioj, lacegaj pro tiom da laborado kaj tribut-

---

[1]) Briand (france). [2]) Dawes (angle). [3]) Michelet (france).

donado, unuiĝos kaj ekribelos sub la standardo de libereco kaj sendependeco. Eŭropo denove estos kampo de malgajo kaj morto, la homa sango kovros la teron kaj ruĝigos la marojn kaj riverojn. Kaj la ekzemplo ne utilos. Oni starigos altarojn. Aliaj potencoj pli fortaj postulos preĝojn kaj respektegon. Tiujn oni devos renversi pli poste, por liberigi la vojon al aliaj pli malfortaj. Kaj tiuj lastaj estos anstataŭigataj denove de aliaj, pli homar-amaj.

Post ĉiu milito la homaro antaŭeniras paŝon, al la paco — al tiu paco, kiu nur estos akirata per la detruo de ĉiuj landlimoj kaj ĉiuj ŝtatoj.

Rolando Ortiz.

El hispana lingvo trad. M. Buscato (11 005).

LA UNUA FERVOJO EN PERSIO

Aro da kapitalistoj diverslandaj alpaŝis antaŭ nelonge al konstruado de unua fervojo en Persio. Tamen la Legantaro ne pensu, ke ili faras tion sole por celoj kulturaj, civilizaj, sed multe pli kaj ĉefe, miaopinie, por povi enpoŝigi multe da mono.

La fervojo okupos spacon de 2 100 kilometroj kaj tratranĉos la tutan longon de la lando (Persio), de Kaspia maro ĝis la Persa golfo. Oficiale ĝi estos konstruata de la persia registaro. Sed laŭfakte la entrepreno, kiu postulas kapitalon de 80 milionoj usonaj dolaroj, estos gvidata de kapitalistoj el plej grandaj imperialistaj landoj: Usono, Anglio, Germanio kaj Francio.

La ĉefintereson en la entrepreno havos tamen la usonaj kapitalistoj, ne nur pro tio, ke la plej grandaj kompanianoj en tiu ĉi negoco estas la usonaj firmoj, sed ankaŭ pro tio, ke la plano mem estas usondevena.

Kiel konate, la usonaj grandfinancistoj serĉadas pli kaj pli novajn regionojn, kie ili povus fari grandajn investojn[1]). Ili sendas specialajn ekspediciojn en la plej necivilizitajn landojn, plej sovaĝajn dezertojn, por esplori, kie kaj kiaspecajn entreprenojn oni povas aranĝi.

Nenecesas diri, ke la plano tre malplaĉas al anglaj imperialistoj. Unue, Anglio ne dezirus, ke usonaj kapitalistoj tiel profunden enpenetru Persion. Ĉar meti grandan kapitalon por fervojo, oficiale konstruata de persa registaro, signifas ja povi influi tiun ĉi registaron. Kaj pro tio, ke Anglio konsideras jam de longa tempo Persion kiel sian duonkolonion, sekve la plano ne povas plaĉi al britaj imperialistoj.

Due, la fervojo estos senpera ligilo inter la Sovetrespublikaro kaj Hindio, tra Kaspia maro kaj Persio. El tio certe ne profitos la anglaj kapitalistoj. Ilia situacio en Hindio fariĝas sen tio pli kaj pli komplika. Ju pli ili ekspluatas la tricentmilionan amason en Hindio, des pli tiu ĉi ribelas kontraŭ ili. Se la planon estus projektintaj kapitalistoj el malpli granda lando, Anglio certe ne allasus ĝin realigi. Sed Usonon kontraŭstari ĝi ne povas. Almenaŭ ĝi atingis, ke ankaŭ ĝiaj kapitalistoj ricevos parton en la entrepreno. Tamen, el tiu kompromiso Anglio nemulte profitos. Estos neeble eviti imperialistajn koliziojn kun Usono senpere en Persio kaj pere ankaŭ en Hindio.

Sed per tio ankoraŭ ne solviĝas la nodo de l' imperialista konflikto. En la negoco estas krome implikitaj Germanio kaj Francio. La usonaj kapitalistoj estas sufiĉe riĉaj por povi sen kompanianoj plenumi entreprenon, kiu postulas tian mizeran sumon, kia estas 80 milionoj da dolaroj. Se ili konsentas kompanion, estas ne pro tio, ke ili tion serĉis, sed pro tio, ke ili ne povas al si helpi. Ili ne estas unusolaj en serĉado religi eĉ dezertojn. La germanaj kapitalistoj okulumis al Persio ankoraŭ antaŭ kelkdekoj da jaroj, komencinte konstrui la bagdadan fervojon. Se ne eksplodus la mondmilito, ili eble jam havus fervojon en Persio. Ili ankaŭ nuntempe povas ĝin konstrui, sen helpo de usonaj kapitalistoj. Sed kion fari, se kontraŭ Usono ili ne kapablas militi?

Komenciĝas do la konstruado de l' fervojo per imperialista batalo, en kiu estas implikitaj ĉiuj plej grandaj kapitalistaj landoj. La entrepreno mem estas grasa osto, pri kiu ili devos akre malpaciĝi. Despli, ke la fervojo trapasos regionojn, abundajn je oro, arĝento kaj kupro — naturtrezoroj, poparte jam delonge ekspluatataj. Ekzistas tie ankaŭ granda merkato de ledo kaj tapiŝoj. Krome la fervojo malfermas la plej mallongan vojon por la komerco inter Eŭropo kaj Persio kun Hindio. Kiu akiros la plej grandan parton en tiu entrepreno, tiu havos la plej bonajn kondiĉojn por ĉi tiu komerco. En tio mem troviĝas multaj kaŭzoj, kiuj povas elvoki imperialistajn batalojn. Kiam oni elpensas, ke tie ĉi temas pri la du grandaj kolonioj — Hindio kaj Persio — estas komprenebla, ke la entrepreno semas ankoraŭ unu kampon por imperialistaj militoj.

L. Bergrad (10 411).

[1]) Investi = meti monon en entreprenon kun celo de profito. Kun tia signifo la vorto troviĝas en la "Komerca Vortaro" de s-o Kreuz. Kvankam laŭ Kabe la vorto havas nur signifon de "solene enkonduki en plenumotan oficon", oni povas bone konsenti la plilarĝigon de la difino, ĉar ĝi estas bezonata.

Socialismo povas naskiĝi nur el kapitalisma sistemo elkreskinta ĝis plena matureco. K. Marks.

Striko de havenlaboristoj en Finnlando

Kiel oni eble jam scias, en Finnlando okazas granda laborkonflikto en formo de striko inter la ŝipŝarĝistaj mastroj kaj la havenlaboristoj. La striko ne estiĝis sole pro salajro, sed plej aktuala estas en ĝi la principa demando pri kolektiva labor-kontrakto por la tuta lando. Tia kontrakto, kiu ekzistas en okcidentaj najbarlandoj, ŝajnas esti tre malfacile akirebla en Finnlando. La entreprenistoj vidas en ĝi grandan danĝeron en formo de grandiĝanta bolŝevista influo kaŭzata de eventuala kontrakto en laborlokoj. La burĝoj estas ĉiam pretaj miksi politikon eĉ inter la plej malgrandan laborkonflikton, kvankam la laboristoj pro puraj panakiraj kaŭzoj devas komenci strikon. Ĉi tiu ja estas la sola humana rimedo por plibonigi la vivnivelon.

La havenlaboristoj ĝis nun laboris sen ia kontrakto por horsalajro de 5—8 finn. mk., kaj ilia laboro dependis tute de bona ŝanco, kiu eble donis al ili 4—5 tagojn semajne laboron, kaj en tre bona okazo 8 horojn tage. Ili komencis striki, kaj la striko daŭras jam monatojn. La labordonintoj sukcesis ricevi ioman nombron da strikrompantoj, kiuj fuŝlaboras kaj ricevas bonan salajron. La laboro nature fariĝas je pli ol duono pli kara ol ĉe ordinaraj laboristoj, kaj la ŝarĝado de unu ŝipo daŭras tre longe. Sed iom post iom pleniĝas iuj ŝipoj kaj veturas al siaj difinitaj lokoj en eksterlando.

Tial ni finnaj laboristoj petas niajn alilandajn K-dojn esti solidaraj kaj eviti la ŝipojn ŝarĝitajn de strikrompantoj en Finnlando ĝis la strikfino. La venko de finnaj havenlaboristoj estos venko por tutmonda havenlaboristaro.

Vojaĝemulo.

Leterkovertojn

viajn kaj **poŝtkartojn** por via korespondado mendu ĉiam nur ĉe la **Administracio de SAT**, Colmstr. 1, **Leipzig O 27** (Germ.). — Ĝi liveras al vi belajn kovertojn (blanka, senligna papero) kun bonefika verda surpreso propaganda por 2 mk. g. po cento, samspecajn poŝtkartojn (tutflanke surskribeblaj) por 1.10 mk. g. po cento.

"Demokratio" en la paradizo de la "Ligo de Nacioj"

(Saarteritorio)

Antaŭ kelkaj semajnoj la registaro de la "Ligo de Nacioj" publikigis dekreton, laŭ kiu estas malpermesate partopreni unuiĝojn kun militista karaktero. Ankaŭ unuecaj uniformoj estis envicigataj tiun ĉi dekreton. Sed ĉi lasta fakte estas tiel fleksebla, ke ne povas ekzisti dubo, kian organizon oni volas trafi per ĝi. Ekzemple estas entenata la frazo, ke pacemaj manifestacioj kaj ekzercadoj povas okazi, kaj ke reprezentanto de la registaro difinos, kiaj uniformoj kaj ekzercoj estos konsiderataj kiel militistaj. Konklude oni povus kredi, ke kontraŭmilitaj organizoj plue rajtus manifestacii. Sed male.

8. julio la anoj de la "Ruĝa Fronto" (organizo kontraŭ imperialistaj militoj) okazigis sian trian sarlandan renkontiĝon. Ĉio estis bone organizita. Lastmomente la policestro sciigis al la gvidantaro la malpermeson de la manifestacio. Sed jam alvenas la unuaj grupoj. La tuta "ĉefurbo" (Zarbriken, germ. Saarbrücken) estas ekscitita. Taĉmentoj de policistoj kaj tiel nomataj landĉasistoj (ĝendarmoj) tramarŝas la urbon laŭ ĉiu direkto por dispeli la alvenantojn. Franciaj kaj italiaj K-doj estas aŭ arestitaj aŭ kondukitaj per ĝisdente armita eskorto al la landlimo. La stacidomo estas okupita per kompanio de ĝendarmoj. Neniu K-do vestita per la uniformo de la "Ruĝfront-batalantoj" devas trapasi la stacidoman elirejon. Malgraŭ tio okazis protestkunveno en grandega salono.

Dimanĉon frumatene estis okupitaj ĉiuj stratoj je la periferio de la urbo per policistoj, kaj neniu policisto ricevis dimanĉan forpermeson. Sur la peronoj de la stacio svarmis policistoj kiel en formikejo. Oni haltigis ĉiun, kiu portis ruĝan insignon. Ekzemple ankaŭ SAT-anon, kiu portis sub la brakoj du pakaĵojn kun ekspozicia materialo. En la grupejo de la "Ruĝa Fronto" ne estis iu libera loko, kaj ankaŭ kelkaj kriminalpolicistoj ĉeestis, laŭdire, nur ĉar ili volis trinki kelkajn glasojn da biero.

La horo de la ekmarŝo alproksimiĝis. La stratoj estis plenplenigitaj de simpatiantoj kaj scivolemuloj. Aŭtomobile, ĉevale, motorbicikle, piede, la gardistoj de la ordo furiozis tra la urbo. Tamen malgrandaj aroj da K-doj sukcesis atingi la kunvenejon, kiu kompreneble estis ŝanĝita kaj tial nekonata al la policistoj. Ankaŭ nia LEA-grupeto el Saarbrücken kuraĝe portis, spite la malpermeso, sian ruĝan standardon tra la urbo. La policistaro fermis la gastejojn, konfiskis afiŝojn kaj standardojn (i. a. ankaŭ la esperantajn). Spite ĉio kunvenis en arbara gastejo ĉ. kvar mil personoj, kie parolis K-do el Berlino. Dume la policistaro furiozis en la interno de la urbo. Ĝi atakis preterpasantajn ruĝfrontanojn per revolveroj, gumvipoj kaj sabroj. Arestitaj ruĝfrontanoj estis kondukataj tra la stratoj kiel krimuloj, trenitaj je la brakoj. 20 estas pli malpli vunditaj kaj 200 arestitaj.

Tiel aspektas la demokratio sub regado de la "Ligo de Nacioj".

SAT-ano 7733.



Ekribeloj de belgiaj laboristoj

Enketo de l' Internacia Labor-Oficejo montris, ke la salajroj estas tre malaltaj en Belgio. Ili nur superas tiujn pagatajn en faŝistaj landoj. La monstabiligo kaj la raciigado de l' industrio efektiviĝas je la kostoj de etburĝaro kaj proletaro. Ĉi tiu vidas, depost du jaroj, unuflanke malkreski daŭre la aĉetpovon de sia salajro, aliflanke plifortiĝi la klasajn organizojn de la mastroj, kaj la faŝistajn grupojn fariĝi pli kaj pli maltimemaj.

Ŝajnas, ke ĝenerale la belgia laboristaro iĝis rezignema kaj akceptas la sorton, kiun preparis por ĝi la kapitalistaro. Tamen, de tempo al tempo, tiun kvietecon rompas subita eksplodo de laborista kolero atestanta, ke la laboruloj ne ankoraŭ tute ŝafiĝis.

Lastatempe, en Kampin[1]), kampara regiono, kie la granda industrio nur ekstariĝas pro la eltrovo de karbo, kaj kie la eklezio kaj la kapitalistoj ankoraŭ senbride subpremas la proletojn, 2000 kristanaj laboristoj strikis dum du semajnoj. En provinco Lieĵ'[2]) jam unu jaron strikas pli ol 1000 ŝtonhakistoj, kaj en Anver (Antverpeno), de du monatoj, 1200 ŝipriparistoj ĉesis labori. En la sama urbo, la 18. marto, 10 000 ŝip-elŝarĝistoj forlasis spontane la havenon, spite la volo de la sindikatestraro. Ili rompis la kolektivan kontrakton kaj postulas tagsalajron de 60 fk., t. e. plialtigo de 10 fk. Naŭ dekonoj apartenas al klasbatala sindikato; la resto al kristana kaj liberala sindikatoj.

La burĝa gazetaro unuanime atakis la strikon per la kutimaj stultaj argumentoj: Komunista influo, soveta mono, eksterlanda mano ktp., esperante timigi la strikantojn kaj malfavorigi la publikon rilate al la striko. Espereble, tiu ĉiuokaze gurdata kantaĉo ne plu efikos, kaj la havenproletoj gajnos la batalon.

Registara enmiksiĝo. La ministro de l' Laboro kunvenigis la estrojn de la diversaj sindikatoj kaj proponis tujan reprenon de la laboro kaj traktadon en la "Egalparta Komisiono de l' Haveno". Spite ĉiuj sindikatestroj la ĝenerala referendumo klare pruvis, ke la proletoj tute aliel opinias pri la gvidado de la striko: la neklasbatalaj laboristoj postulis per plimulto daŭrigon de la striko, kaj pli ol naŭ dekonoj de la klasbatalaj strikantoj same voĉdonis. La burĝaj gazetoj vekriis, ĉar eĉ kristanan kaj liberalan sindikatojn "infektis la komunistoj"! La "Fédération Maritime", mastra sindikato, rifuzas traktadi kun la laboristaj sindikatestroj, ĉar ili estas seninfluaj sur siajn membrojn.

Klasa solidareco kaj klasperfiduloj. La tutlanda klasorganizo de l' belgia mastraro (Comité Central Industriel) voĉdonis simpatirezolucion favore al la havena mastraro. Aliflanke, 300 oficistoj sin prezentis por elŝarĝi ŝipon, kiu vojaĝas inter Belgio kaj Kongo.

Sekvoj. En Gent, malgranda enlanda haveno, la elŝarĝistoj ĝis nun ne ankoraŭ agis, sed ankaŭ tie la spiritoj bolas. Pri la salajro de maristoj oni traktadas jam delonge en komisiono, kaj oni atendis decidon lastsemajne. Sed la mastroj prokrastas la decidon, ĉar ĝi ĉiuokaze favoros la strikon. Plialtigo por maristoj plivigligos la strikon; malbona decido por ili kondukos kredeble tiujn lastajn al kunstrikado kun la elŝarĝistoj. Estas bedaŭrinde, ke la elŝarĝistoj ne agis kelkajn semajnojn pli frue komune kun la ŝipriparistoj. Ambaŭ korporacioj estus profitintaj el kunagado. Kredeble la malsolidareco estas, tiuokaze, malbona konsekvenco de la kolektiva kontrakto.

M. v. A. (155), Bruxelles.

[1]) france: Campine. [2]) france: Liège.

La multkoloraj, ilustritaj poŝtkartoj de SAT

estas unika provo, bilde esprimi nian idealon. En la korespondado kun varbotoj tiuj kartoj estos tre utilaj al vi. Tial aĉetu ilin ĉe la **Administrejo de SAT,** R. Lerchner, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.** La kompleta serio, konsistanta el 5 diversaj kartoj, kostas **0,50** g. mk.

La laborista klaso deziras neniajn miraklojn de la Komuno. Ĝi ne havas fiktivajn kaj pretajn utopiojn por realigi la popol-decidon. La laborista klaso scias, ke por ellabori sian liberiĝon kaj kun tio ankaŭ pli altajn vivoformojn, kiuj senĉese kontraŭas la hodiaŭan socion per ĝia propra ekonomia disvolviĝo, — ke ĝi, la laborista klaso, devas longdaŭre batali, devas trapaŝi tutajn vicojn de historiaj procedoj, per kiuj la homoj, kaj samtiel la cirkonstancaro, entute aliiĝos. Ĝi havas nenian idealon por efektivigi, ĝi devas liberigi nur la elementojn de la nova socio, kiuj disvolviĝis en la sino de disfalanta burĝa socio.

K. Marks.

Trad. M. Ŝpetrik (5323).

NEGRO KIEL GVIDANTO DE STRIKMOVADO

En n-o 195, pĝ. 313, ni aperigis mallongan noton pri la persista, longedaŭra striko de la karbministoj en diversaj regionoj de Usono, i. a. en Pensilvanio. En tiu lasta regiono distingiĝis en la rolo de gvidanto la negro Ĉarli[1]) Fulp. Ni eltiras la sekvantan skizon en mallongigita formo el Rote Fahne (Ruĝa Standardo), Vieno. — Red.

Granda, forta, mole parolanta kaj sentime rigardanta staras Ĉarli Fulp, la negro-organizanto el Pensilvanio, antaŭ la kunveno. Li venis rekte el la minejo al Novjorko por organizi la helpon por la ministoj. Kelkaj nigraj K-doj akompanis lin. Depost semajnoj ili parolas ĉiuvespere antaŭ entuziasma laborista publiko, kaj post ilia simpla priskribo de la tragedia situacio de l' ministfamilioj ili kolektis multajn milojn da dolaroj kaj grandan kvanton da varmaj vestoj por la malsatantaj K-doj.

Oni devas scii, ke Fulp unuigis blankajn kaj nigrajn karbosklavojn. Por ĝuste kompreni la signifon, necesas koni la rasan malamon, kiu persekutas la "malbonodoran negron" eĉ ĝis la praarbaro. Por montri la solidarecon, oni elektis "Ĉarli"-n unuanime konfidito. La fakto, ke depost la agadkomenco de Fulp la ministkomitatoj preskaŭ ĉie estis gvidataj de negroj, pruvas, ke la ministoj konvinkiĝis pri la stulteco de la rasbataloj.

Dĵems Flod[2]), la prezidanto de l' sindikata distrikto depost 1924, nenion faris kontraŭ la perforto entreprenista. Kiam la salajro estis malpliigita je triono, kaj fine la striko ekflamis, la sindikato ĉesigis ĉian subtenadon, kaj tiel la situacio de l' strikantoj fariĝis baldaŭ katastrofa. Tial la laboristoj ekprovis sin helpi: ili elektis komitaton, inter kies anoj ankaŭ estis Fulp, kiu komencis, cetere sensukcesan, traktadon kun la sindikata centro en Novjorko.

Oni denuncis Fulp kiel "agenton de la entreprenistoj por varbi strikrompantojn". La laboristoj, kiuj konis la senmakulan honestecon de Fulp, priridis tiun fabelon. Al la malsataj, frostsuferantaj laboristoj oni nun sendis agentojn, kiuj rakontis al ili pri "mirindaj salajroj en la nordaj farmoj". Kelkaj negroj lasis sin blufi. Sed kiam ili alvenis en la novan "laborlokon", oni metis ilin sub akran gardon kaj enkarcerigis ilin. Multajn rekondukis Fulp, kvankam li mem evitis nur malfacile la arestiĝon.

La vivo de Fulp estas en ĉiama danĝero. Ŝtato kaj entrepenisto volas lin kapti. Nokte gardas strikantoj lian domon, depost kiam du "nekonatuloj" lin dormantan ekatakis.

Nigruloj kaj blankuloj ŝatas lin kiel fraton bonkoran, prudentan, agadfortan. Kiam Fulp diras: "Striko", tiam virinoj kaj infanoj prefere malsatas, ol ke eĉ funto da karbo estas elterigata. Sed li zorgas, ke neniu malsatu. Li laboras en Novjorko, parolas kaj kolektas. Ripete li akcentas, ke tiu ĉi batalo estas gvidata nur por la modesta vegetebleco. Li diras ankaŭ, ke eĉ per la venko de la pensilvaniaj minejoj estos malmulto atingita, dum la kapitalismo ankoraŭ ekzistas.

La indiferentaj laboristoj de Novjorko sentas por li — eble la unuan fojon — la spiron de klaskonscio.

Esp-igis (7579).

1) Angle: Charlie.
2) Angle: James Fload.

★ DIVERSAĴOJ ★

La longega pasteĉego

Unuafoje depost la jaro 1896 Denbi Del[1]), urbeto en Anglio, intencas fari je 4. aŭgusto grandan pasteĉon. Per tio oni esperas havigi al si la monsumon de 3000 sterl. funtoj, kiun oni volas donaci por pligrandigi la malsanejon (lamulejon) de Hadersfilt'[2]). Laŭ la vendo de biletoj la sumo estos atingata. Tiaj lokaj pasteĉoj estas kuriozaĵo. La unua estis kuirata jam en la 18-a jarcento. Ili estas la plej grandaj en la mondo. La farota pasteĉo pezos kelkmil kilogramojn kaj enhavos mil kilogr. da bovaĵo, mil kilogr. da ŝafviando, kelkcent kilogr. da birdviando kaj multajn aliajn aĵojn. Speciala pladego estos konstruata, kiu havos diametron de 3 metroj. La pasteĉo mem estos tegata per krusto de kelkcentimetra dikeco kaj estos interne subtenata per speciale preparota trabaro. La ĉefa laboro estos la tranĉado de la pasteĉo. Oni utiligos ĉevalojn, por formovi la pasteĉon al la izolita loko, kie vilaĝano, elektita por tiu laboro, distranĉos ĝin per tranĉilo tiel granda kiel glavo kaj por tiu celo fabrikita. Ĉe lasta simila okazo amasiĝis proksimume 60 000 homoj. En tiu ĉi jaro oni esperas, ke la nombro ankoraŭ pligrandiĝos. Por havigi al si parteton de la pasteĉo, oni devas aĉeti ŝilingan bileton. Ŝajne la unuan fojon tia pasteĉo estas farata sen celo festi okazon de nacia graveco (kiel ekz. ĉe jubileo de reĝino Viktoria).

L. Sykes, Darnale-Sheffield.

1) Angle: Denby Dale.
2) Angle: Huddersfield.

JAŜASUN

Skizo pri Meža Azio

(Fino)

La homoj laboras. Ili aranĝas "ĝojak"-ojn[1]). Aro da tiuj "ĝojak"-oj similas al ia fantazia volvaĵo, kiun oni faris kun intenca nezorgeco. Tamen necesas granda sperto. Kiam oni enlasas akvon en la kanaletojn, la kampo atestas mirigan akvumadan sistemon. La bedoj elstaras super seninterrompa, senfine volviĝinta vejno de akvoporta kanalo. Ĉiu peceto de la grundo estas akvumita, ĉiu kreskaĵeto ricevas sian porcion da akvo. Oni enlasas la akvon tra sola truo ĉe unu rando, kaj trakurinte longan zigzagan kaj volvitan vojon inter ĉiuj "ĝojak"-oj, ĝi ellasiĝas ĉe la alia rando, en la najbaran kampon ktp. Se la tero jam estas sufiĉe nutrita, oni simple ŝtopas la eniran truon kaj direktas la akvon en alian lokon, kie ĝi estas bezonata.

Oni ŝparas la akvon. Malŝparemo signifas minacon de malsato! Oni gardas la akvon. Ekzistas institucio de specialaj reguligantoj de akva distribuo. Oni nomas ilin "ak-sakal"-oj[1]) kaj "mirab"-oj[2]). Ambaŭ oficoj estas elektaj. Oni komisias tiun ĉi respondecan laboron al la plej estimataj, la plej ne-subaĉeteblaj vilaĝanoj. Tamen ... tamen ekzistas malbonuzoj: spekulacio per la akvo. Oni severe kondamnas la krimulojn, kiuj rompis la kutimon sanktigitan per jarcentoj. Rakontoj pri senkapigo kaj kripligo ne estas fabeloj en Turkestano.

Dum la tuta vegeta periodo kotono kaj rizo postulas regulajn akvumojn de la kampoj, tiu laboro daŭras dum la tuta somero. Kiomfoje la okuloj esperplene fiksiĝas al supro de la montoj, kie degelas trezora neĝo: — Ĉu sufiĉos la akvo, ĉu maturiĝos la kreskaĵoj? . . .

Jen la kamparano. Per tre peza "ketmenj"[1]) li fosas la bedojn. Tiu ĉi laborilo ŝajnas maloportunega. Tamen ĝi estas la sola ilo por ĉiuj manlaboroj en la kampoj kaj ĝardenoj. Oni uzas ĝin, cetere, tre lerte kaj produkteme. La indiĝeno estas ankoraŭ tre konservativa rilate la uzon de l' kampa laborilaro. Tiujn ĉi "ketmenj" kaj "omaĉj"[2]) oni uzis antaŭ jarmiloj.

La regno aplikas multajn klopodojn por atentigi la kamparanojn pri la utilo de eŭropaj laboriloj. Por la regno estas tre grave popularigi pli taŭgajn laborilojn, ĉar ili akcelus plialtigon de la rikolta normo kaj de ĝenerala spezo

1) Bedoj por koton-semado.

1) Laŭvorta trad.: blankbarbulo; signifo: akva estro.
2) Ankaŭ akva oficisto de pli alta rango.

1) Indiĝena fosilo.
2) Indiĝena plugilo, tre primitiva, lignaĵa.

TAGO EL MIA VIVO

La tagoj en la vivo de la proletoj ja ĉiuj komenciĝis egale. En tre frua horo ankaŭ mi devas grimpi el la lito, ne volonte, ĉar la sindikata kunveno de la antaŭa vespero ree daŭris tre longe. La temo de la aŭdita parolado de sindikata funkciulo kaŭzis multhoran diskuton post la kunveno. — Sed fine mi estas lavita, prenas la poŝon kun la pano, prenas la gazeton de antaŭ la pordo kaj forkuras. Forlasinte la domon, jam komenciĝas la unua peno de la tago: konkiri lokon en la fervoja vagonaro, kiu grandegajn amasojn da laboristoj devas transporti al la loko de ilia laboro. La distancoj en Berlino inter loĝejoj kaj laborejoj estas ja tre grandaj, kaj estas stranga fakto, ke laboristo, loĝante meze en la urbo, laboras tute ekstere de Berlino, kaj la loĝantoj de la antaŭurboj ofte laboras en la urbo mem. Tiel ĉiumatene estas granda batalo, por ricevi modeste malgrandan parton da spaco, tiom kiom kutime homo bezonas, por stari kun dense al la korpo premitaj brakoj, elspirinta pulmo kaj restante senmova sur unu loko. La direkcio de la fervojo tre bone komprenas preni monon, sed ĝuste kaj hominde transporti la personojn, ne estas ĝia afero. Por 1,30 mk., kiom kostas semajna abono ĉe la fervojo, laŭ opinio de la direkcio tute sufiĉas loko, kiun havas la sardinoj en sia oleskatolo. Por tio la duaklasaj kupeoj estas matene tute malplenaj; sed estas severe malpermesite uzi ilin kun la semajnaj biletoj.

Perdinte kelkajn funtojn da korpa pezo per tia sporta masaĝo dum la veturo, mi atingas post preskaŭ unuhora veturado la ĉiutagan celon, mezgrandan presejon en antaŭurbeto de Berlino. Tie ĉi oni daŭrigas la sporton. La ĉambro, en kiu ni ŝanĝas la vestojn, troviĝas en la teretaĝo, kaj la laborĉambregoj en la tria kaj kvara etaĝoj, en tute alia parto de la granda domo. Kiu nun havas la malfeliĉon veni kelkajn minutojn post la sepa, devas unue kuri al la tria etaĝo, por havigi al si la ŝlosilon, due salti al la teretaĝo, por ŝanĝi la vestaron, trie denove grimpi al la tria etaĝo, por fine tie komenci "kun freŝaj fortoj" la ĉiutagan laboron.

La kompostejo estas sufiĉe granda, sed tre bone, pro ŝparemo de la ĉefo, instalita kun tute neuzeblaj lampoj. La sporto de la ĉefo nun estas, iri tra la ĉambroj je la oka horo matene, aserti, ke ekstere jam estas hela tago kaj estingi la lampojn. Ni ilin tuj reeklumigas, asertante, ke la taga lumo ne sufiĉas. Tiu beleta ludo ripetiĝas ĉiutage. La laboro mem estas tre interesa. Mi ĉefe kompostas katalogojn kaj prospektojn en angla kaj franca lingvoj. Ankaŭ bonajn anoncojn mi ricevas, por komposti ilin. Post tiu okhora interrompo de mia libera tempo kaj denova sporto per la vagonara reveturo mi komencas esti homo, kiom estas eble al mi. Mi razas kaj lavas min. Vespere mi havas difinitan programon. Unufoje semajne mi iras por naĝi, unufoje mi skribas, unufoje mi vizitas miajn infanojn, kaj la resto estas dediĉata al politika porkomunisma laboro. Tiel preterpasas ĉiu tago en mia ĝisnuna vivo. Alfred Kraushaar (120).

Al ĉiuj Soveti-anoj!

Monon por la Adm. de SAT, ne sendu al Leipzig, sed al nia bankkonto ĉe C. K. de SEU en Moskvo. Niaj bankoj ne akceptas sovetian monon. — *Adm.*

Kompatindaj "Sennaciuloj"

Unu el la plej malnoblaj fenomenoj de la postmilita tempo estas la maniero, kiel oni traktas la tielnomatajn "senhejmulojn". Graz (Aŭstrio, Stirio) estas la plej granda urbo proksime de la jugoslavia limo kaj grava trapasejo por ĉiuj tiaj malfeliĉuloj. Ĝi ankaŭ estas la plej uzata "piedpilkludejo" por ludoj per homoj. Du okazoj pri ĉi tiu filudado estu montrataj, kiuj estas ekzemploj de la tiom ofte okazantaj homaj tragedioj. Ambaŭ okazoj koncernas hungarajn ŝtatanojn. Hungario ja donas al la mondo la plejmulton la senhejmaj viktimoj.

Unu estas maljuna senlaborulo, kiu dum ok jaroj vivas en Graz. Li pulmomalsanas. Lia filo nutris lin laŭpove, sed li ankaŭ devas zorgi pri granda familio; sekve ne multo restas por la patro. Iam la maljunulo almozpetis sur strato kaj tuj estis kaptata de policisto. En la registrejo oni eksciis, ke li ne estas aŭstro. Ok jarojn li restis en Graz, kvindek jarojn li ne plu estis en sia "hejmlando". Tamen oni traktis lin kiel fremdulon kaj transveturigis lin Hungarion. La hungaroj agis simile kaj resendis lin Aŭstrion, ĉar li jam delonge perdis la hungaran civitan-rajton. Kio nun okazos pri la kadukulo? Ĉu refoje komenciĝos la piedpilkludado per li?

La dua estas hungara politika rifuĝinto. Dum li havis laboron, li vivis en Vieno. Perdinte sian laboron, li provis envojaĝi Jugoslavion. Kelkfoje li sukcesis ŝtelire transpaŝi la limon kaj tie labori tiom longe, ĝis la manko de pasporto devigis lin remigri al Aŭstrio. Lastfoje li ree venis Jugoslavion kaj laboris en Belgrado. Sed la Belgrada estraro baldaŭ eksciis, ke li ne havas la paperan rajton por vivado. For de sia laborejo li migris en la malliberejon. Post kelksemajna restado en ĉi tiu "agrabla" loko, oni kun ŝtata akompano veturigis lin al la aŭstria limo, kaj tie li estis "transĵetata" (t. e. la oficiala esprimo por tiu ĉi ago). Sen transdono al la aŭstria estraro, oni devigis lin ŝtelire transpaŝi la limon. Nun li migradis al Graz, sen dokumentoj, ĉar tiujn estis forprenintaj la jugoslavaj ĝendarmoj. Pro tio li tuj estis kaptata, kaj post mallonga restado en la domo de la devig-vojaĝuloj li refoje estis "ĵetata" trans limon. Tio okazis vespere, kaj jam dumnokte li denove estis kaptata de jugoslavaj ĝendarmoj. Ĉar la aŭstria limo estis tiom proksima, oni reĵetis lin trans la limon. Nun li estas refoje kaptito de la aŭstrianoj, kaj denove povas komenciĝi la "piedpilkludado per homo".

Aŭstria SAT-ano (10504).

---

de kotona produkto. Por instigi kotonproduktadon, la regno donas por ĉiu plantanto de la kotono difinitan sumon da kredito kaj provizon da necesa porsem-materialo — kontraŭ la kontrakto vendi la rikolton nur al la ŝtataj aĉetejoj, ne al iu alia. Kotonproduktistojvilaĝanoj mem unuiĝas en kooperativoj por firmigi la garantion plenumi la kontrakton, kaj ricevi kelkajn priservojn por siaj mastrumaj bezonoj (provizo per maŝinoj kaj elektita semaĵ-materialo) kaj bezonoj organizaj (klerig-laboro, agrikultura laboro ktp.). La rezultoj de tiu kooperigo de la laboro jam estas videblaj. Antaŭ kelkaj jaroj oni deklaris traktoron "ido de satano", — nun la incita bruemo de la maŝino aŭdiĝas tie kaj alie kiel ritmo de la nova vivo.

Kantas Ĝurabaj:

"Ho, kiam mi vendos la kotonon,
Mi ricevos sonoplenan monon;
Poste iros mi al Raĥim, la najbaro,
Metos la "kalim"-on sur la manon;
Diros: donu al mi la filinon —
Belan Odoljat-ĥana."

La vojo de Oriento al feliĉo, al bono kuŝas trans malkonstruo de l' arkaika mastrumsistemo, trans forigo de la spiritaj baroj: religio, tradicio, rito; trans ĝenerala kooperado... Multo devas esti reviziata, tre multe — rektaksata. Ĝermoj de tiu kritikemo, reformemo kaj progresemo jam ekzistas, ili baldaŭ ankoraŭ kreskos...

Kiel muzika akompano por mia pensoj sonas improvizaĵo de Ĝurabaj:

"Ho, traktoro estas la maŝino bona,
Bonan donos ĝi al mi rikolton,
Portas novan ĝi al mi la vivon, —
'Jaŝasun'[1]) la vivo nova! ..."

La suno kribras sian oron kaj varmon tra verda foliaro. La vojo kuras ĉiam antaŭen...

"Jaŝasun! ... Dm. Albanov.

[1]) Vivu!

Korektoj. — Korektu en n-o 198, pĝ. 338, dua kolono, de supre 5-a linio: "insultvortojn, batojn kaj spionaĵojn" (anst. nominativo); same, linio 17, legu "kudraĵon" (anst. kudradon).

TRA ESPERANTIO

INTER NI

Iu K-do skribis: "Via sennaciismo estas eble ĝusta teorie, sed taktike ĝi estas ne aprobinda. Laboristaj partioj neniel povus akiri influon sur la amasojn, starante ĉe tia vidpunkto. En la nacie subpremataj landoj, la proletoj kaj mizeruloj firme kredas, ke ilian malbonan situacion kaŭzas la konkirintoj. Ili proprokule vidas reprezentantojn de la subpremanta nacio, kaj ilia malamo trovas tiel konkretan objekton. En Irlando, ekzemple, Konoli[1]) *ĉiam diris: "Ni liberiĝu el la brita jugo por konstati, ke la kapitalismo estas la malamiko — ne la brita nacio."*

Gvidantoj de partioj havas kiel ĉefan celon kapti la regadon en siajn manojn, kaj sekve ni bone komprenas, ke ili ne tro volas kontraŭstari al la antaŭjuĝoj de la amasoj.

Sed SAT difinis al si alian taskon. Ĝi celas eduki; ĝi klopodas, ke ĝiaj membroj inter si *ignoru la naciojn, tial estas tute logike, ke ni kutimiĝu prikonsideri problemojn je propra vidpunkto. Neniam ni proponis al nesamlingvanoj nian taktikon; ni nur celas montri, ke jam laboristaj esperantistoj staras ĉe la pinto de la alta monto, al kiu sin direktas la Laboristaro.*

Ni ja tro bone scias, ke la historian procezon ne gvidas la racio. La antaŭenirado de la homaro tre ofte okazas zigzage, palpe, blinde. Sed ĉu viduloj devas sekvi la saman vojon kiel blinduloj? Pli precize: ĉu sennaciuloj devas ankaŭ oferi sian vivon en bataloj por nacia liberiĝo, se ili jam konvinkiĝis, ke tio estas nur trompa iluzio? Ĉu patriotoj ne sufiĉas por fari tiun eksperimenton?

Ĉar la grandega plimulto da homoj estas movata de la sentoj kaj antaŭjuĝoj, ne estas mirige, ke la homara evoluo okazas en sangaj bataloj. Sed kiu konas la rektan direkton, ne erarvagas tra dornoplenaj, malrektaj vojoj. Sennaciulo, kiu ne deziras sin mortigi, provas preterpasi la interpuŝiĝojn, kie diversspecaj naciuloj batalas inter si. Mi konsentas, ke la afero ne ĉiam estas facila. Sed ĉu decas, ke saĝulo kondutu kiel frenezulo, se okaze li troviĝas en frenezulejo?

Iu kontraŭvole, akcidente mortas en milito. Aliu memvole oferas sian vivon en tiu sama milito. Ni ne samigu la du okazojn. E. L.

---

[1]) Angle: Connoly.

Raportaro de la Ekzekutiva Komitato de SAT

Resumo de la raportoj prezentotaj de la Ekzekutiva Komitato ĉe la Kongreso


(Daŭrigo)

RAPORTO DE LA ADMINISTRACIO DE SAT

(1927/28)

Situacio de la membraro

Ĉar la Jarlibro, kiun mi en tiu ĉi momento bedaŭrinde ankoraŭ ne posedas, ne donas tute klaran bildon pri nia membrostato (en ĝi estas cititaj adresoj de membroj, kiuj ankoraŭ ne repagis por tiu ĉi jaro), ni donas ĉi tie la veran staton de la membraro, nome de tiuj, kiuj pagis sian kotizon ĝis la 1-a de julio. Repagis aŭ novaliĝis ĝis tiu dato: Aktivaj membroj: 5534, pasivaj membroj 636, sume 6170 membroj. Pasintjare (meze de junio) la membrostato estis jena: 4593 aktivaj, 623 pasivaj, sume 5216 membroj. La kresko en tiu ĉi jaro estas sekve 954 pagantaj membroj. Kiel kutime, ni devis ankaŭ ĉi-jare elimini konsiderindan kvanton da slipoj, 1997. Se tiuj membroj estus renovigintaj sian membrecon, ni havus nun la nombron de 8167. Precipe en Sovetio la diferenco estas tre granda, pro aliĝo kaj eksiĝo de "sezon-membroj". Strange estas, ke inter la nepagintoj troviĝas konsiderinda parto, kiu resendis la plenigitan "demandilon", sed tamen ĝis hodiaŭ ne plenumis sian financan devon.



Kresko de la SAT-anaro

Sennaciulo

Ni konstatas malrapidan, tamen daŭran kreskadon de la abonantaro. De n-o 195 (28. junio) ni ekspedis 3218 ekz. al pagantaj abonantoj (inkluzive la vendekz. al kelkaj K-doj). Pasintan jaron ni ekspedis de n-o 142 — 2583 ekz. Sekve ni havas pluson da **635** abonantoj. Per tiu kreskado de abonantoj la buĝeto de "S-ulo" denove resaniĝis post la pasintjaraj frapoj. Gravan monhelpon al SAT donis ankaŭ tiuj K-doj, kiuj dum la pasinta jaro ricevis la gazetojn kolektive kaj estis tiom afablaj akurate disdoni ilin.

Komence de la jaro nin ofte trafis plendoj pro nericevo de la gazeto, kvankam ni sendis ĝin laŭ nia kontrolo. Esploroj montris, ke kulpis la poŝtistoj en la vagonar-poŝto, kiuj ordigas la div. sendaĵojn kaj sendis niajn presaĵojn en malĝustajn direktojn.

La stato de "La Lernanto" restis preskaŭ la sama kiel antaŭjare. La nuna eldonkvanto estas 9500 ekz. Apartajn abonantojn ni havas sume 86 (pasintjare 30). Krom tio aĉetis germania LEA 5000 ekz., francia LEA 250 ekz., hungaria LEA 150 ekz.

Sennacieca Revuo

La stato de l' abonantaro estas 1047 kontraŭ 1094 en la antaŭa jaro. Sekve malkresko je 47 abonantoj, kvankam ni dissendis pli ol 300 prov-ekzemplerojn ĉefe al edukistoj kaj instruistoj. Konsekvence tiu revuo bezonas mon-aldonon, ĉar la enspezoj ne egaligas la elspezojn.

Eldona Fako de SAT

La librostoko estas nia ĉefa financa bazo. Ĝi ofte subtenis la aperigon de "S-ulo" kaj "S.R." en kriza tempo. Kvankam ni ne sukcesis eldoni dum la lasta duonjaro librojn, ni jam transdonis kelkajn manuskriptojn al la presejo. Pro la malalta kotizo nia eldonagado estas iom malhelpata. La administrajn elspezojn grandparte portas la eldonfako. Post plialtigo de la kotizo tiu stato ĉesos. Ni vendis el niaj eldonaĵoj jenon (krampe ni citas la staton de l' antaŭa jaro):

Tri verkoj de Tolstoj: eld. 1922, 2000 ekz., provizo 2 (86). — For la Neŭtralismon: 3 eldonoj (1922, 1923, 1928), eldonkv. sume 7000 ekz., provizo: 2875 (35). — Ni Legu: 3 eld. 1923, 1924, 1926, eldonkv. sume 7000 ekz., provizo 1761 (2516). — Goethe-Faŭsto: eld. 1923, 2300 ekz., provizo 39 (134). — Eklumo en la Abismo: eld. 1923, 2200 ekz., provizo 508 (735). — Dokumentoj de Komunismo: eld. 1924, 2000 ekz., provizo 577 (655). — La Komunista Manifesto: 2 eldonoj, 1924, 1925, eldonkv. sume 3000 ekz., provizo 1175 (1378). — A. B. C. de Sennaciismo: 2 eldonoj, 1924, 1926, eldonkv. sume 3500 ekz., provizo 1519 (1800). — Malgranda Terbiblio: eld. 1924, 1500 ekz., provizo 602 (785). — Nur Volu: Unua eld. 1924 kiel Krestomatieto de "S.R.", 1000 ekz. Dua eld. 1926, 2000 ekz., provizo 950 (0). — Proletaria Kantaro: eld. 1924, 3000 ekz., provizo 1687 (2067). — Kontraŭ Dio: eld. 1925 kiel Krestomatieto de "S. R.", 1000 ekz., provizo 0 (6). — La Kemio de la Universo: eld. 1925, 2000 ekz., provizo 847 (993). — El la Mondbildo de l' nova Fiziko: eld. 1925, 2000 ekz., provizo 882 (1014). — Petro: 2 eldonoj, 1925, 1926, eldonkv. sume 25 000 ekz., provizo 2167 (8430). — Labor-Kajero al Petro: eld. 1926, 10 000 ekz., provizo 6205 (7471). — La Morto de Blanjo: eld. 1925, 2000 ekz., provizo 976 (1183). — Orienta Blovo: eld. 1926 kiel Krestomatieto de "S. R.", 1500 ekz., provizo 884 (1037). — El Katenoj de Maljusteco: eld. 1926 kiel Krestomatieto de "S. R.", 1500 ekz., provizo 955 (1208). — Sekspsikologio: eld. 1926, 2000 ekz., provizo 1121 (1305). — Ruĝo kaj Blanko: eld. 1926, 2000 ekz., provizo 1142 (1250). — Etiko: eldonita 1926, 2000 ekz., pro-

vizo 991 (1242). — Karl Marks, Lia Vivo, Lia Verko: eld. 1926, 2000 ekz., provizo 875 (1136). — Ŝtato kaj Revolucio: eld. 1926, 2000 ekz., provizo 972 (1218). — Je la Nomo de l' Vivo: eld. 1927, 2000 ekz., provizo 842 (1131). — Kvardek Jaroj: eld. 1927 kiel Krestomatieto de "S. R.", 1000 ekz., provizo 700 (0).

Aliaj eldonaĵoj

Insignoj: Ni eldonis sume 4960 grandajn kaj 3630 malgrandajn SAT-insignojn. La nuna provizo de la grandaj estas: 733 (pasintjare 1911), de la malgrandaj 644 (p. j. 1352). Ilustritaj poŝtkartoj: eldonkv. 181 300 ekz., provizo 165 664 ekz. Sekve ni vendis ĝis nun 15 636 ekz. Ni ne tre rapide disvendas tiujn kartojn. Simplaj poŝtkartoj kaj kovertoj estas tre volonte uzataj. Bedaŭrinde tiun varon ni ne povas laŭplaĉe ekspedi al Sovetio, ĉar la tieaj dogan-oficistoj konsideras ĝin kiel imposteblan.

Akcibiletoj de nia Kooperativo

Stato je 1. julio 1928: venditaj el serio A sume 841, resenditaj kiel pagiloj 129, sekve restas 164 akcioj po 1 dol. plus rentumo (ĉar ili restis dum 3 jaroj en posedo de la aĉetintoj), 548 po 1 dol. sen rentumo. El serio B estas sume venditaj 347, resenditaj kiel pagiloj 50, sekve restas 141 akcioj po ½ dol. plus rentumo kaj 156 po ½ dol. sen rentumo.

Vortaro

La dudekan de marto ni subskribis kontrakton kun 4 fakuloj, laŭ kiu ili devas liveri al ni antaŭ oktobro nunjare la duonon de la manuskripto por Vortaro, kies amplekso estos proksimume 500-paĝa. La dua duono estas liverota en februaro aŭ plej malfrue en marto 1929. Ni pagos al tiuj aŭtoroj 12% dum 15 jaroj kiel aŭtorrajton. (Kutime oni pagas al la aŭtoroj dum ilia tuta vivo kaj tridek jarojn post ilia morto al la heredintoj). Ni jam kontraktis kun presisto kaj antaŭpagis por aĉeto de papero 12 000 frankojn. Antaŭ ol entrepreni la aferon, ni kolektis promese la duonon de la sumo (4500 markojn). Necesas, ke ni trovu la alian duonon ĉe la K-doj kaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la afero. Ĝis nun ni kolektis: a) firmaj mendoj 600 fr. fr. + 1508,33 gmk.; b) prunto efektiva 13 000 fr. fr.; c) prunto promesita 13 000 fr. fr., sekve de niaj alvokoj en "S-ulo" kaj en "Heroldo de Esperanto".

Kiel ni jam publikigis, la enhavo de nia vortaro estos konforma al la Akademiaj konsiloj.

Kompleta raporto pri "Sennaciulo" aperos en la jubilea, 200-a numero.

EL NIA LETERARO

Kial malsukcesas korespondado

"En n-o 192 de "S-ulo" aperis anonceto de K-do Mikelsons alvokante K-dojn skribi al li pri teatroj ktp. Mi respondis al la anonceto precipe por montri, ke eĉ en la varietea fako de la teatra profesio troviĝas klaskonsciaj homoj. Kompreneble, ni ĉiuj bone scias, ke estas granda diferenco inter aktoroj kaj varieteaj artistoj. Tamen mi opiniis, ke inter K-doj ne estas necese pesi la diferencon per pesilo. Sed ŝajnas, ke mi eraris, juĝante laŭ jena skribaĵo de K-do Mikelsons:

"Sinjoro!

Kiam mi ricevis vian leteron, mi efektive ne sciis ĉu ridi, ĉu koleriĝi. Je mia anonco pri serioza koresp. pri teatro, vi kuraĝis respondi pri iuj varieteaĉaĵoj. Homo, ĉu vi ne komprenas, kio estas teatro?! Teatro estas arto kaj aktoroj estas artistoj, sed variete-ludistoj estas nur metiistoj, kiuj sufiĉe lerte plenumas siajn artifikojn. Sed ĉu tio estas arto? Ĉe ni ĉiuj tre ŝatas arton, teatran precipe, kaj en teatron oni iras nun kiel antaŭe en sanktejojn. Kun estimo oni alproksimiĝas al teatro. Sed ĉu tiel estas rilate al kinoj kaj variete-scenejoj? Tute ne. Variete-ludistoj, cirk-artistoj estas homoj, kiuj ĉe ni ne estas ŝatataj, kaj ilian profesion oni nomas aĉa. Ĉu vi komprenas? — aĉaĵo estas la tuta variete- kaj cirk-prezentado. Homoj, kiuj iom komprenas pri kulturo, pri arto, alivorte, civilizitaj homoj sentas naŭzon kontraŭ jam nomitaj artistoj. — Mi esperas, ke vi nun bone komprenas, ke mi deziras serioze korespondi pri teatra arto, sed ne pri aĉaĵoj. Mi miras, ke vi vin nomas K-do. Vera laboristo ne havas profesion similan al via, kies celo estas korpe kaj spirite tikli riĉulojn, kiuj ne scias kie kaj kiel pasigi la tempon. Nur kun K-doj mi korespondas, sed ne kun servistoj de parazitoj[1]). Ed. Mikelsons."

[1]) Eble en Latvio nur laboristoj vizitas teatrojn kaj burĝoj — cirkojn kaj kinojn. En Parizo, ekzemple, okazas la malo. Kredeble pro tio, ke en teatroj la sidlokoj kostas tro multe. Estas ankaŭ interese rimarkigi, ke gravaj revuoj kiel "Monde", kies direktoro estas H. Barbüs (france: Barbusse) recenzas kinajn kaj cirkajn prezentaĵojn kaj konsideras ilin kiel artaĵojn. Ne temas ĉi tie nun decidi, ĉu tiu revuo kaj aliaj pravas aŭ ne. Almenaŭ ĉiu leganto de "S-ulo" devas kompreni, ke ne ekzistas serioza motivo por malŝate paroli pri varieteaj "artistoj", kiel faras K-do M. Ĉu nur la K-doj, kiuj kompostas faŝistajn gazetojn, fabrikas militilojn, kondukas luksvagonarojn por burĝoj ktp. ktp., estas "laboristoj"? — E. L.

. . . Ricevinte lian skribaĵon kaj leginte, ke li ne deziras korespondadi kun mi, vere, mia koro rompiĝis. Kion fari nun? Ho ve, ho ve. Nur restas unu sola rimedo, kaj tiu estas, ke mi dronigu min, kaj feliĉe troviĝas rivero proksime de mia domo.

Mi esperas, ke K-do Mikelsons estos sufiĉe bonkora por plenumi mian lastan deziron: ke li sendu al mi ŝtonegon, por ke mi povu ĝin ligi je mia kolo. Tiel mi pli rapide iros al la fundo de la rivero.

Rimarku ankaŭ, K-do Redaktoro, ke K-do Mikelsons diras: civilizitaj homoj ktp. Sed kie ili estas? Kvankam mi serĉas jam depost 30 jaroj, mi ankoraŭ neniam trovis tian. Tamen, eble ili estas ĉiuj en Latvio. Mi ankaŭ tre dezirus scii la sekreton de K-do Mikelsons: kiel vivi ne estante la servisto de la kapitalistoj nuntempe. Tiu sekreto interesos aliajn K-dojn.

Via kamarade

S. H. T. (7471)."

Pri la korespondado

Ne prava estas K-do "Silentemulo" (n-o 194). Precipe amaso da novaj esperantistoj konsentos kun mi. Ĉiu el ni ja memoras: Kio estis instigilo, kio estis por ni la viva montrilo, ke esperanto estas efektiva interligilo? Kio entuziasmigis nin lerni la internacian lingvon? Certe, unue la korespondado. Laŭ propono de "Silentemulo" oni antaŭe lernu, lernu, lernu kaj iam oni korespondu. Ĉu la korespondado mem ne instruas iom post iom? Se ni obeus la konsilon proponitan — nia movado tro malrapide disvastiĝus. La plej interesa, bonega instigilo por ĉiu komencanto mankus, la korespondado. Tute kontraŭe. Post kelkaj lecionoj la gvidanto jam devas korespondigi siajn lernantojn. Tio estas la plej bona rimedo aligi ilin al nia movado. Certe, ĉiu letero devas esti severe korektata.

Ne tio estas la kaŭzo de l' malbono. Ni havas multajn bonegajn ecojn, sed ni ne havas korespond-disciplinon, la akuratecon. Ne nur novaj komencantaj esperantistoj ĝin ne havas — jam malnovaj, spertaj suferas je la sama malsano. Kiu devas gvidi, tiu mem ofte ne plenumas sian devon.

Kion fari? Pri anonco de malrespondantoj mi tute konsentas kun K-do "Silentemulo". Ni devas akuratigi, disciplinigi nin mem. Kiel?

1. En ĉiu n-o de "S-ulo" presigante "la nigran liston de malbona korespondanto"; 2. Memorigante, ke oni devas korespondi nur laŭ anonco; 3. Nepre transdonante adreson al alia K-do, se SAT-ano ricevis leteron k mem ne povas respondi; 4. Precipe atentante pri la komencantoj-korespondantoj, ĉar nia malakurateco ofte ilin tute forigas de nia movado. Al komencantoj helpu, neniam ilin lasu sen respondo.

Paŭlo Tilin, Leningrado (9310).

Propagando necesas inter la junularo

La plej multaj laboristaj organizoj havas infan- kaj junular-taĉmentojn: la partioj, la sportaj, liberpensaj, samaritanaj, migrulaj asocioj k. a. Infan- kaj junular-taĉmentoj estas la fonto, el kiu tiuj organizoj ĉerpas ĉiujare novajn fortojn kaj tiele pligrandigas sian anaron, agante laŭ la frazo: "Kiu havas la junularon, al tiu apartenas la estonto". Bedaŭrinde ni ne sufiĉe atente pritraktis tiun demandon ĉe niaj Kongresoj. Se ni havus infan-taĉmentojn, ni povus ĉerpi el ili novajn fortojn por la SAT-movado.

Lasu nin fondi[1]) esp-ajn infan- kaj junulargrupojn inter la konformaj taĉmentoj de la laboristaj organizoj, kun ili paroli pri esp. korespondado kun eksterlandaj infan-taĉ-

[1]) Nenio en la SAT-Statuto malpermesas tion! — Red.

PRIKONGRESAJ PROPONOJ

Propono 7

Enstatutigi lokajn grupojn kaj tiel fari ilin aŭtonomaj, bazaj organoj de SAT.

Propono 8

La kongreso komisiu la Direkcion de SAT nomi komision en ĉiuj landoj, sen escepto, kie troviĝas politikaj malliberuloj-SAT-anoj. La taskoj de tiuj ĉi komisioj estu: zorgi ĉiel por K-doj malliberigataj aŭ ekzilataj kaj se iel ajn eble por liberigo de ili.

Propono 9

La kongreso alvoku la SAT-anaron en Sovetio direkti solidarecan atenton al la sorto de gek-doj Levandovski kaj gekunuloj kaj per tiea komisio plej eble kun la kunhelpo de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo klopodu pri rekonduko de la koncernaj gek-doj al antaŭaj labor- kaj loĝlokoj.

Laŭ Komisio de Nov-Jorkaj SAT-anoj
Theo Weder (1307).

Propono 10

Aldoni al la Statuto sub artikolo 19 jenan tekston: "Povas partopreni en la gvidorganoj de SAT ĝiaj dungitoj nur laŭ la proporcio de 1:3, t. e. en la E. K. ne povas eniri pli ol tri pagataj SAT-oficistoj. En aferoj, kiuj koncernas la propran situacion de SAT-dungito, ĉi tiu ne havas voĉdonrajton."

Propono 11

Kompletigi en la Statuto, art. 4, la trian frazon per jena teksto: "Ĉiuj aktivaj membroj de SAT devas a) nepre voĉdoni . . ., b) laŭpove aboni la presorganojn de SAT . . ."

Propono 12

Ŝanĝi en la Statuto, art. 18, la duan frazon jene: "Ili kunvenas okaze de ĉiu Kongreso, se eble."

Ekzekutiva Komitato de SAT.

mentoj, pri sporto, liberpenseco, politiko, migrado ktp. kaj tiel entuziasmigi la infanojn pri esp-o. Ĉu ni havas ilustritajn lernolibrojn por infanoj? La instruantoj devas komence de esp. kursoj iniciati la korespondadon, ĉar praktika pruvo instigas la lernantojn. Por enpenetri la lernejojn, ni devas varbi la instruistaron. En gepatraj kaj instruistaj kunvenoj oni devas pritrakti enkondukon de esp-o en lernplanon. La instruistoj kolektu lernantojn el diversaj lernklasoj kaj instruu al volontuloj. Instruistoj, kiuj estas varbitaj por esp-o, scias entuziasmigi ankaŭ la gelernantaron. La geknaboj poste interesos siajn gepatrojn kaj gefratojn. Tio estas nova propagand-rimedo.

Tre grava tiucele estas la laboro de la esp. instruistaro. Ili traktu laŭ kiel eble plej larĝa mezuro nian aferon en siaj fakaj gazetoj. Ili aperigu en "S-ulo" sciigojn pri siaj sukcesoj, por ke la artikoloj estu uzotaj por aliloka propagando. La gazetaro estas la plej bona propaganda rimedo. Bedaŭrinde oni ne ankoraŭ sufiĉe scias eluzi ĝin. La artikoloj de "S-ulo" servu ne nur al la esp-istaj legantoj, sed estu atingeblaj por la vastaj amasoj. — Tiele propagandante, la fruktoj baldaŭ montriĝos.

Karl Rösch (4398).

ATENTIGO

La venonta numero (n-o 200) aperos en amplekso de 16 paĝoj, kun multaj originalaj artikoloj kaj ilustraĵoj!

Esperanto k junularo

La Mondjunulara Ligo, kiu uzas en siaj presaĵoj k korespondaĵoj esp-on, aranĝas de 6.—12. aŭgusto sur la kastelo Freŭsburg ĉe la Sieg-rivero (Rejnlando, Germanio) Internacian Junul-Tendaron, en kiu oni povas partopreni, pagante kotizon de 1 gmk. k submetiĝante al la tendara disciplino. Ĉiutaga esp-leciono troviĝas sur la programo. Paroladoj k diskutoj okazas aŭ en esp-o aŭ estas tradukataj en esp-on. Fervoja stacio: Betzdorf (linio Köln-Betzdorf). Adr.: Werner Jantschge, Eckenheimer Landstr. 287, I. Frankfurt a. M. (Germanio).

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Organizovani Radnik, Belgrado, 1. 5. Sklavaro; Organizovani Radnik, Zagreb, 30. 6., Negra sindik. movado, Kresko de lab. mov. en Jap.

Represis el "S. R.":

Organizovani Radnik, Belgrado, 19. 4., Majstroj k disĉiploj, 17. 6., Rakonto al SAT-anidoj; Le Matérialiste, Laeken-Brux., junio, art. de Spiridoviĉ el n-o ateista.

Priesper. notojn k artik. enhavis:

Daily Herald, London, 29. 6.; Uj Elöre, Nov-Jorko, majo, junio; Der Deutsche Eisenbahner, Berlin, 24. 6. (kurso); Magyar Tanügy, Bratislava, majo (instruista gaz.), enh. esp. ang., enhav-indikon, alvokon k. a.; La Voz, Malaga, n-o 9.

Pri SAT k "S-ulo" enpresis:

Uj Elöre, Nov-Jorko, majo, junio, div. notoj, Krasni Gornjak, Krivoj-Rog, 23. 6.; L'Etincelle (Fajrero), Bruselo, jun., pri esp. k recenzo pri "S-ulo", laŭde menciante la faktan valoron de nia gaz. pro uzo de esp. Tre trafa propagando!

Peresp. leteron enpresis:

Die Rote Fahne (Ruĝa Standardo), Berlin, 1. 5.

NIA POSTO

5296. — Ni konsentas kun vi pri la de vi kritikita anonco; sed ĝi ne estis senpaga, k la nuna buĝeto de "S-ulo" ne permesas al ni rifuzi plej malgrandan sumon.

Kontraŭfaŝisto. — En la tempo, kiam ni ricevis vian "Unua de Majo", ne mankis al ni materialo, sed male ni havis abunde. Pri la alia, ni jam sciigis ĉi tie, ke ni uzos ĝin nur en okazo de bezono; ĝia valoro ja ŝajnas al ni modera. Vi ne rajtas plendi pro neenmeto de viaj artikoloj: multaj kaj eĉ sufiĉe ampleksaj jam aperis (ekz. en n-oj 180, 187, 189, 190). Rilate vian polemikan pledon por subteni viajn proponojn, ni transdonos ĝin al la Komisiono, elektota en Göteborg por studi k raporti pri la kongresaj proponoj. Via argumentado cetere estas absolute mistrafa: La K-do, kiun vi kritikas, ja estas mem ateisto, k ne nur parole sed age, k pri tio povas liveri pli da pruvoj ol iu ajn. Sed ne tiel prezentiĝas la demando; ĝi estas: ĉu nur ateistoj povas aliĝi al SAT? E. L.

6191. — Ni publikigas proponojn, sed ne "opiniojn" pri proponoj. Vian karton ni transdonos al la Komisiono elektota en Göteborg por studi la diversajn proponojn. E. L.

M. v. A. — La uloj, pri kiuj vi parolas, estas eble aĉaj, sed elektis ilin laboristoj. Sekve, kiel vi prezentas la aferon, la legantoj de "S-ulo" devus konkludi, ke la elektintoj estas stultaj. La afero cetere havas ĉefe lokan intereson, tia informo pli taŭgus por ĉiutaga partia organo ol por "S-ulo". E. L.

695. — Akceptita por la venonta n-o.

8865. — Via artikolo aperos, kredeble en "L. L.".

4398. — Ni ricevis vian art. de 27. 5., kiu malgraŭ sia longeco ne ŝajnas enpresinda al ni. Sekve ni eltiris nur la "kronikan" parton. La laste senditan ni aperigis en tiu ĉi n-o. Ni ne havas tempon por korekti taskojn. Se vi gardas kopion de viaj skribaĵoj k se ili aperos, vi povos kompari vian tekston kun la presita. Ĝenerale ni rimarkigu, ke vi plenigas tutajn paĝojn per rimarkoj, kiujn oni povus esprimi per kelkaj, malmultaj frazoj. Sekve lernu verki koncize!

K. K., Cmieluv. — Via artikolo aperos en okazo de bezono. Red.

2144. — Via anonco en n-o 199 kostas 5 gmk.

6477 k 8497. — Viajn kotizpagojn ni ne jam ricevis. Adm.

Redakcio de Perma gazeto "Zvezda" aranĝas internacian enketon pri la temo:

"KION ONI PAROLAS ĈE VI PRI SOVETIO?"

Ni invitas Vin, respondi la enketon kaj larĝe diskonigi ĝin. Estas petataj tradukitaj gazeteltranĉaĵoj de por- kaj kontraŭsovetiaj artikoloj, karikaturoj ktp. La respondanto laŭeble bonvolu indiki sian aĝon, profesion, oficon kaj politikan partiecon.

Internacia Korespondfako de "Zvezda".

Adreso: **Redakcio de "Zvezda", Perm.** Uralo (Sovetio).

Jus aperis la julia kajero de

Sennacieca Revuo

SCIENCA SERIO

ENHAVO:

G. URBAIN: Studo pri scienca disciplino. — G.-C. FLAMMARION: La naskiĝo de stelo. — MARCELLIN BERTHELOT: La Homaro en la jaro 2000. — P. B.: La vivo, manifestiĝo de mikroba kemio? — P. BLANC: La vivo de la termitoj (Maeterlinck). — Prof. d-ro RIEDL: Pri la efiko kaj signifo de toksinoj en organismo (orig.)

«o»

Nia Asocio aplikas sciencecajn metodojn en la pririgardo de soci-politikaj problemoj. Por lerni juĝi laŭ principoj de objektiveco k relativeco, ni povas nur insiste rekomendi al niaj membroj, kiuj volas kleriĝadi, la legadon de la Studo pri scienca disciplino en tiu ĉi kajero, pro ĝia alta eduka valoro.

Mendu la n-on ĉe

Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

Prezo: 0,35 gmk.

Plenan bildon pri la kultura vivo de l' Sovetaj respublikoj, pri iliaj ekonomio, literaturo, artoj, ktp. donas ilustrita ĵurnalo

La Informa Bulteno

de la "Societo por kulturligoj de USSR kun eksterlando" ("VOKS"), aperigata en tri eldonoj — en germana, angla kaj franca lingvoj.

"La Informa Bulteno" ekzistas jam la 4-an jaron kaj aperas la 1. kaj 15. de ĉiu monato. La abonprezo estas:

	1 eld. dol.	2 eld. dol.	3 eld. dol.
Por jaro	2.—	4.—	5.50
„ duonjaro	1.—	2.—	2.75
„ kvaronjaro	0.60	1.20	1.73

Ĉiuj abonintoj ricevas senpage informojn pri ĉiuj demandoj de kultura vivo en USSR.

Provnumero senpage.

Mendojn k abonmonon sendu al Administracio de SAT: **Richard Lerchner, Leipzig O 27, Colmstr. 1.** Poŝtĉeka Konto: Leipzig 6835.

SAT-anoj ne pruntedonu vian Jarlibron al iu ajn. Ĉiam postulu, ke servopetanto montru sian membro-karton. Gardu vin kontraŭ profitemuloj kaj parazitoj!

ENHAVO:

	paĝo
Internacia vivo	343—44
La unua fervojo en Persio	344
Striko de havenlaboristoj en Finnlando	344
"Demokratio" en la paradizo de la "Ligo de Nacioj"	345
Ekribeloj de belgiaj laboristoj	345
Negro kiel gvidanto de strikmovado	346
Diversaĵoj	346
Jaŝasun	346—47
Tago el mia vivo	347
Kompatindaj "Sennaciuloj"	347
Tra Esperantio	348—50
Anoncoj	350

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)